

Dr. Leono Zamenhof, War-
szawa (Varsovio)
W. M. Page, advokato, Edin-
burgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto,
București
Teo Jung, Horrem b. Köln
Frans Schoofs, Antwerpen
(Anvers)
P. v. Medem, bank- kaj
fabrikdirektoro, Kaunas.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas al-
donata al ĉiu specimena kaj unua
numero de nova abono.

ESPERANTO

TRIUMFONTO

3. 6. 1923

Administrejo:
(aŭŝca adreso)
Esperanto Triumfonta,
Horrem bei Köln, Germani.

Redaktistaro:
Ĉefredaktisto: Teo Jung.
Kunredaktistoj: M. Buijn, L. K.
Literatura redaktisto: Zanoni.

Kunlaborantoj
inter la Esperantistaro de
la tiumondo.
Manuskriptojn oni skribu nur sur
unu flanko de l' papiro.

Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas al-
donata al ĉiu specimena kaj unua
numero de nova abono.

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikgilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.

Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Antwerpen-Anvers, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem b. Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

Konferenco de Lausanne.

La kontrakto de Chester. — Pola-turka
komerca traktato. — La Bagdad-Fervojo.

Lausanne, 20. majo.

-ng- La realaj sukcesoj de la Konferenco de
Lausanne estas tiel malgrandaj, ke preskaŭ oni
povus kredi al ironiema kritikanto, kiu diris, ke
la mortigo de Vorovski estas la unua „videbla
rezultato“ de la diskutoj...

Progreso oni tamen faris, kvankam ne en
la salonoj de la konferenco, sed — ekstere.

La „Kontrakto de Chester“ estis la komenco.
Ne estas bona signo, ke la Konferenco ankoraŭ
ne ektuŝis la problemojn de tiu multe diskutata
kontrakto: oni ankoraŭ ne kuraĝas, paroli pri la
plej delikataj aferoj, timante, ke ilia diskutado
povus eksplodigi la konferencon! Tial oni daŭr-
igas, ordigi aferojn malpli gravejn...

Hodiaŭ komenciĝas en Lausanne separata
traktado inter poloj kaj turkoj por prepari polan-
turkan komercan traktaton. Generalo
Ismed Paŝa kaj s-o Voronovski, la pola ministro
en Svislando, gvidas la laborojn.

Kiel trian rezultaton oni citas hodiaŭ sepa-
ratan „anglo-germanan traktaton“ pri la
Bagdad-Fervojo. La „Matin“ de Paris jam parolas
pri politika skandalo, sed en Lausanne mem oni
ne havas la saman opinion. Cetere, la situacio
ankoraŭ ne estas sufiĉe klara. Tamen, tute objek-
tive, oni povas konstati tion: La „Banko por
orientaj fervojoj“ en Zürich kontrolas la fervojojn
en Anatolio kaj la linion Konia-Haidar kun
branĉo al Angora. Finance ĝi partoprenas: en
la „Anatolia Fervoja Kompanio“ per 32 milionoj
da svisaj frankoj, en la „Havena Kompanio de
Haidar“ per 9,7 milionoj, kaj en la „Fervoja
Kompanio Mersina-Tarsus-Adana“ per 1 060 704
sv. frankoj. Ĝi disponas pri kapitalo de 71,7
milionoj sv. frankoj (35 milionoj en akcioj, 36,7
milionoj en obligacioj).

La milito en Malgranda Azio kal certaj dekretoj
de la turka registaro malebligis al ĝi dum kelkaj
jaroj, mem administri iliajn fervojojn kaj ricevi
detalajn informojn pri ilia funkciado. Tial la
banko troviĝas en tre kriza situacio kaj preskaŭ
ne plu povas pagi la interezojn por sia obligacia
kapitalo! Tre logike, ke ĝi serĉadis helpon kaj
ke ĝi provis, ricevi tiun helpon per financistoj
el grandaj, politike fortaj ŝtatoj. Angla grupo,
direktata de la London-a bankisto barono Schroeder,
traktis pri la afero en Zürich kaj en Lau-

sanne kaj subskribis, antaŭ kelkaj tagoj, „pro-
vizoran kontrakton“. Tiu kontrakto disponigas
al la Zürich-a banko kapitalon, kiu estas necesa
por la regula pago de la interezoj al la obligacio-
posedantoj. Interŝanĝe la angla grupo ricevas
kelkajn rajtojn de kontrolado, kio cetere estas
tute logika.

Pri aliaj gravaj interkonsentoj oni ankoraŭ ne
povas paroli, ĉar laŭ deklaro de la banka direkt-
isto la diskuto pri la ceteraj paragrafoj de tiu
kontrakto ankoraŭ ne finiĝis.

Ankaŭ francaj kaj italaj financistoj forte interes-
iĝas pri tiu afero. La angla „Schroeder-grupo“
invitis do la aliajn financistojn al konversacio
en London. La itala grupo jam akceptis; la
francoj ankoraŭ ne respondis. Sed la Paris-a
jurnalo „Matin“ parolas pri politika skandalo kaj
diras, ke la turkiaj fervojoj, kontrolataj de la svisa
„Banko por Orientaj Fervojoj“, devus esti kon-
fiskataj de la „Ripara Komisiono“, laŭ la „Paca
Traktato de Versailles“, ĉar tiu Zürich-a banko
kaŝus kapitalojn de la germana „Deutsche Bank“. Svisoj
kaj angloj protestas kontraŭ tiu aserto kaj
deklaras, ke la Zürich-a „Banko por Orientaj
Fervojoj“ estas jam delonge internacia entre-
preno, pri kiu la „Versailles-a Paca Traktato“
ne rajtas paroli. La agentejo „Reuter“ konfirmas
tion per deklaro, kiu venas verŝajne ne nur de la
Schroeder-grupo, sed ankaŭ de la brita registaro.

Larĝvidaj politikistoj cetere diras, ke tiu kon-
trakto kun la svisa „Banko por Orientaj Fervojoj“
fariĝus baldaŭ komuna kontrakto inter Britio,
Francio kaj Italio — kontraŭ la avantaĝoj, kiujn
amerikaj kapitalistoj havigis al si en Turkio per la
„Kontrakto de Chester“.

La rana marĉo.

La ĉi subaj linioj estas elĉerpitaj el libro titolita „La
homo stultega“ de la universala konata franca scienculo,
Prof. Richet. Tiu libro estas sorigita kritiko de la sen-
nombraj antaŭjuĝoj kaj mallogikaj, al kiuj la homoj estas
trot ofte emaj: ĝi majstre skurgas la malklerajn malamikojn
de Esperanto.

Iafoje, dum somero, sur granda ebenejo, sub
la salikoj karesistal de la lastaj radioj de l' kuŝiĝ-
anta suno, oni vidas la senmovan surfacon de iu
lageto, apenaŭ malkvietigita per la zumado de iu
libelo aŭ la malproksima eĥo de iu *Angelus*-
sonorado.

Se tiam, dum tiu silento, iu pasanto jetas
ŝtonon mezen de la kanoj, oni subite aŭdas teruran
bruegon.

Tria soldato. Jam la trian fojon en la lasta
horo.

Kvina soldato. Dio scias, kion li ĉiufoje
faras ekstere — dum la gardado. — Mi ne scias.

Kvara soldato. Mi ankaŭ ne. Eble en la
kantino oni scias tion.

Dua soldato. Ĉu oni pentras tie la nazojn?

Kvara soldato. Jes, tie oni pentras ilin ruĝe.

Kaporalo. Eksilentu, ne moku la nazon de
superulo!

Kvina soldato. Kiel mi diris: Mi ne scias,
kial la alta ordonanto tiel ofte — eliras; sed mi
scias ion tute alian — kion neniu el vi scias —
eĉ ne la serĝento.

Kaporalo. Kion do? Eldiru!

Kvina soldato. Mi scias, kial la serĝento
Huberto malsaniĝis.

Kaporalo. Nu, kial?

Kvina soldato. Mi tion diros je unu kon-
diĉo.

Kaporalo. Konsentite, parolu!

Kvina soldato. Je la kondiĉo, ke neniu el
vi piedbatu min, kiam mi ronkos.

Unua soldato. Ekzemple kiel lastfoje; sed
tion la serĝento ordonis. Mi devis obei.

Kvina soldato. Jes, li ordonis. Tio okazis
laŭ alta ordono. Sed vi ne bezonis piedfrapi —
en tia maniero!

Unua soldato. En kia maniero, nome?

Kvina soldato. Tiel forte!

Unua soldato. Mi tamen ne estas kulpas,
ke mia boto estas tiel malmola.

La aliaj (*ridas laŭte*).

Kaporalo. Nu, trankviligu! Mi ne ordonos
tion, eĉ se vi ronkos. Kaj se la serĝento ordonos...

nu, la ordonoto povos piedfrapi tre malforte
Nun eldiru vian sekreto!

Kvina soldato. Serĝento Huberto malsani-
ĝis, ĉar li ne volas ĉeesti la ekzekutadon de
Dupuis.

Kaporalo. Jen!! Kiel vi scias tion?

Multaj centoj da ranoj sallegas ĉie el la marĉo
kaj senfine kvakadas: Kiu malamiko, kiu fremd-
ulo venas interrompadi nian kvieton? Kaj la
kvakado freneze rekomencas, momente silentiĝinte.

Muzikaĉon tian provokis la sola ideo de inter-
nacia lingvo.

Lingvo internacia! Kia frenezajo! Kia ĥimero!
Kiel? La homoj ne plu estus disigitaj per la diferenco
de siaj idiomoj? Kiel? Ili ne plu bezonus grama-
tikojn, vortarojn, interpretistojn por komunikiĝoj?
Kiel? Norde kaj sude, la samaj homaj elparoladoj
havis la saman signifon? Ĉu vere ĉiuj homoj reci-
proke sin komprenus kaj eble ne plu interbatalus?
Sed tio estus abomenaĵo!

Kaj tamen, se restas iu espero ĝi nian vivon
malpli mizera kaj malfacila, ĝi kuŝas en la fakto,
ke ekzistis unu nura lingvo parolata aŭ almenaŭ
komprenata de ĉiuj homaj gefratoj.

Ĉu la komercistoj, la industriistoj, la marlistoj,
la sciencistoj, la artistoj, la literaturistoj devas
rezigni kaj por ĉiam resti sen iuj parolaj rilatoj
kun la homoj de la aliaj landoj? Iu franco sci-
povanta nur sian patrolandan lingvon, irante al
London, New York, Roma aŭ Madrid, estos preskaŭ
perdita en tiu nova mondo, en kiu ĉio estos
nekonata por li.

Ĉio fariĝus facila, se al nia patrolanda lingvo
(kiun forlasu estus erarego) ni povus aldoni
internacian lingvon.

Nu, Esperanto, derivanta de la latina lingvo,
kaj kreita de la geniega Zamenhof, havas grama-
tikon tiel simplan, ke oni povas ĝin perfekte koni
post unu horo da lernado. Cetere, la vortaro
estas lernebla en unu monato maksimume.

La malplej sagacaj intelektuloj bone komprenas,
ke ĉiuj popoloj povus, per komunaj klopodoj,
rapidege starigi al si la internacian lingvon, kiu
neniel atakante la patrolandan fariĝus la helpa
universala lingvo, parolata kaj komprenata de ĉiuj,
la nura nepre lernota. Tiu reformo, kiu aliformi-
ĝus la mondon, estas ebla, eĉ facila.

Jen nia indiferenteco, nia frivoleco, nia nevid-
ebleco pri estonto, jen verdire nia stulteco! Jen
belega eltrovajo, kiu regeneracius la homaron; la
homo idiota ĵus brueme vekigis por ĝin kontraŭ-
batali.

Charles Richet.
Tradukinto Ernest Archdeacon.

Kvina soldato (*aŭskultas, ĉu iu venas; post
momento*). Hieraŭ vespere mi staris garde ĉe la
kazernepordego. Subite venis al mi serĝento
Huberto. „Dubois!“ li diris. „Aŭskultu! Post
 kvin minutoj mi kondukos eksteren soldaton. Ne
atentu lin! Li faros por mi malgrandan komision
kaj revenos post kvar horoj. Enlasu lin tiam,
sed ne rigardu, ne atentu lin!“ — Mi diris: „Bone,
serĝento; se li venos de dekstre, mi turnos min
tute okaze maldekstren, kaj se li venos de mal-
dekstre, mi turnos min dekstren...“ tiamaniere
mi ne povos vidi lin.“ — La serĝento foriris kaj
revenis tuj poste kun la mistera eliranto. Vi
komprenas, ke mi estis scivola kaj, tute okaze
turnante min dekstren, ĉar li venis de maldekstre,
miaj okuloj intence turnis sin maldekstren — kaj
kiun, laŭ via opinio, mi vidis?

Kaporalo. Katinistino!

Kvina soldato. Katinistino? Kun via
permeso, kaporalo, la serĝento estas sufiĉe bel-
aspekta viro, sed multe tro maljuna por katinis-
tino. La katinistinoj pli volonte okupas sin
kun lunaj kaporaloj. (*Ĉiuj ridas*)

Kaporalo. Ne ridu! Nu, daŭrigu, Dubois!
Via sekreto fariĝas interesa.

Kvina soldato. Mi rakontos plue; sed silentu!
Memoru, ke ĝi estas sekreto! (*Aŭskultas, ĉu iu
venas; flustre*.) Tiu mistera dumnokta eliranto
estis — Dupuis.

Ĉiuj (*surprizite*). Dupuis?

Kvina soldato. Ŝt... Ŝt...! Ne kriu tiel
laŭte! Min preskaŭ atakis miaj nervoj, ĉar mi
pensis: Eble mi estos respondapri la forkuro de
tiu dumnokta eliranto. Sed mi tuj ekpensis pri
la vortoj de la serĝento, ke tiu misterulo revenos
post kvar horoj. Tamen vi komprenas mian mal-
trankvilon, mi ne dormis en la ripozhoroj.

Kaporalo. Kaj vi ne ronkadis —

Kvina soldato. Kompreneble, mi ne ronka-
dis kaj ne rompis la ordon en la gardejoj; sed
mi nur pripensis mian malagrablan situacion.

Fine mia vico revenis por stari garde ĉe la porde-
go, kaj mi staris tie kun la teruro en mia sto-

Esperanto kaj Internacia Labor-Oficejo.

La mala numero de „France-Esperanto“ enhavas
interesan citaĵon el oficiala letero de Int. Lab.
Oficejo, datumita la 20. marto kaj ricevita de s-o
Ernest Archdeacon. „F-E.“ publikigis ĝin kun
speciala permeso de la direktoro de I. L. O.:

1. La nombro de leteroj en Esperanto ricevitaĵ
ĝis la nuna tago estas 120.

2. La nombro de leteroj ricevitaĵ ĉiumonate
multe varias. La maksimumo estas atingita en
oktobro 1921 (38 leteroj), tuj post la publikigo
de tri flugfolioj en Esperanto. De tiu tempo nur
kelkaj leteroj estis ricevataj ĉiumonate; jen la
ciferoj rilataj al 3 lastaj monatoj: decembro 19,
januaro 12, februaro 9.

3. Ĉi tiuj leteroj ne estas klasigitaj laŭ landoj,
kaj ni ne povas doni statistikon pri la landoj de
deveno; ĉiuokaze ili alvenis el tre multaj landoj.
La plej granda nombro venis el Anglujo, Francujo
kaj Germanujo; iu kvanto estis adresita el
malproksimaj landoj: Finnlando, Litovujo, Eston-
ujo, Algerio, Respubliko de la Ekstrema Oriento, ktp.

4. La nombro de respondoj en Esperanto sendita
de la Oficejo estas 53.

5. Unu membro el la oficistaro estas komisiita
je la korespondado kaj je la preparo de eldonaĵoj
de la Oficejo en Esperanto. Ĉi tiuj eldonaĵoj
enhavas, krom neperiodaj eldonoj, ĉiusemajnajn
komunikaĵojn kaj bultenon aperantan ĉiudumonate.
La oficisto, kiu havas tiun taskon, oficiale re-
prezentis la Oficejon en la Kongreso de Helsinko,
kaj dum ĉi tiu kunveno faris paroladon en Esper-
anto, kiu aperis en novembro 1922 en „Esper-
anto“, organo de UEA. Unu aŭ du aliaj oficistoj
de la Oficejo konas kelkajn elementojn de Esper-
anto.

6. La korespondado interŝanĝita en Esperanto
de la Oficejo kaj la sperto akirita de ĝia re-
prezentanto en la Kongreso de Helsinko pravas,
ke ĉi tiu lingvo estas ilo por konigi en kelkaj
medioj la verkon de I. L. O. Neniu ekzemplo de
servol faritaĵ per la uzo de Esperanto povas esti
citata, krom unu okazo, kie — post korespondo
en ĉi tiu lingvo kun grava kooperativa organizo
de Lublin (Polujo) — la Oficejo povis ricevi de
ĝi nombron da utilaj informoj, koncerne la inter-
nacion Jarlibron de Laboro, dediĉitan al polaj
kooperativaj organizaĵoj.

mako, timante ke Dupuis ne revenos. Sed feliĉe
je la interkonsentita horo li reaperis. Li estis
tirinta la ĉapon trans la orelojn kaj kaŝis la kapon
inter la levitaj ŝultroj; sed mi rekonis lin kaj ĝojis
kiel pendumito, kiam neatendite la ŝnuro disŝir-
iĝas. La serĝento jam duonan horon atendis lin en
angulo post la pordego, kaj duope ili pasis preter
mi kaj malaperis sur la korton.

Kaporalo. Tio estas misteraĵo! Kion do
Dupuis faris ekster la kazerno?

Kvina soldato. Tion mi ne scias; sed mi
scias, ke li estas bona amiko de la serĝento, kaj
la serĝento ne volas ĉeesti lian ekzekutadon —
tio estas klara —, kaj tial li anoncis sin malsana.
(*Paŝoj aŭdiĝas.*) Ŝt... Ŝt...! La alta ordon-
anto revenas!

Kvina sceno.

La antaŭaj. La Serĝento Pettit.

Serĝento Pettit (*revenas; li estas ankoraŭ
pli ebria; li sidigas ĉe la fenestro kaj fumas.*
*Post momento li metas la poŝhorloĝon sur la
tablon kaj, rigardas ĝin*). Ankoraŭ dudek-ses
minutoj, kaj refoje unu transportiĝos en la alian
mondon. La malsaĝulo! Kial forkuri? Li jam
antaŭe sciis, kio rezultos el tio. (*Ridante.*) For-
kuri! Kien forkuri? Kvazaŭ ĉiuj voloj estus
malfermitaj por forkurantoj de la Granda Armeo!
Mil diabloj! Tio estus io bela, se ĝi estus tiel
facile farebla. Ni havas sufiĉajn rimedojn por rekapti
ilin ĉiujn, kaj se la milita konsilantaro ne farus
finon al tiu diabla forkurado, hml, tiuokaze restus
eble neniu soldato en la kazerne. Imagu tian
situacion! Kazerne sen soldatoj — serĝentoj sen
subuloj! Kiel tiam la „malgranda kaporalo“, la
imperiestro, trudus sian altan volon al tiu rusa
urso? — Mi diras: Ni bezonas ekzemplojn tim-
igajn por forigi ĉe la soldatoj ĉiun deziron for-
kuri. (*Al la soldatoj.*) Pripensu tion, buboj!
Zorgu pri tio, ke oni ne uzu vin kiel tiun timigan
ekzemplon, — pripensu tion! (*Rigardas sian poŝ-
horloĝon.*) Kaj post dudek-kvar minutoj vi spertos,
kiel tia ekzempl'o efikas. Kaj se vi demandas

MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto.
Origine verkita de H. J. Bulthuis, L. K.

(5-a Daŭrigo.)

Serĝento Pettit. Ne, kapitano. Li sin ne
prezentis denove. Li estas ankoraŭ malsana.

Kapitano. Mi ne komprenas tion. Hieraŭ li
estis sana kiel fiŝo en akvo. (*Al si mem.*) Li
fariĝis eble tro maljuna.

Serĝento Pettit. Li ja resaniĝos baldaŭ,
kapitano.

Kapitano. Kiel vi scias tion?

Serĝento Pettit. Li estas forta —, malsani-
ĝas preskaŭ neniam.

Kapitano (*al si mem*). Mi komandos alian
serĝenton por ĉeesti la ekzekutadon. (*Rigardas
ĉirkaŭe kaj foriras tra la maldekstra pordo.*)

Paŭzeto.

Tria sceno.

La antaŭaj sen la Kapitano.

La soldatoj kaj la Kaporalo (*rekuŝiĝas
sur la dormejo*).

Serĝento Pettit (*rigardante tra la fenestro*).
Tiu ne revenos en la unua kvarono da horo. (*Al
la Kaporalo*.) Mi devas foriri por kvin minutoj,
kaporalo. Prenu la komandon dum tiu tempo!
Zorgu pri tio, ke la ordo ne estu rompata! Ĉu
vi komprenas? (*Li foriras tra la dekstra pordo.*)

Kvara sceno.

La samaj sen la Serĝento.

Kaporalo (*leviĝas kaj sidigas ĉe la fenestro;
imitante la voĉon de la Serĝento*). Ĉu vi kom-
prenas? Neniu rompu la ordon! (*Ridetas moku.*)

Kvina soldato. Mi ne ronkos, kaporalo.

La aliaj (*laŭte ridas*).

Dua soldato. Jen la alta ordonanto — foriris.

7. La tri unuaj flugfolioj en Esperanto estas Jisdonitaj pere de UEA al ĝiaj delegitoj, kun peto traduki ilin en sia nacia lingvo kaj prizorgi la publikigon en loka gazetaro. Ĉi tiuj gazetal-tranĉaĵoj dividigas laŭlande kiel sekvas:

Hispanujo 15	Bulgarujo 6
Nederlando 19	Rumanujo 1
Svedujo 29	Estonujo 2
Litovujo 1	Kanarioj 1
Hungarujo 4	Aŭstrio 2
Belgujo 7	Danujo 4
Turkujo 1	Saar-Teritorio 1
Alĝerio 2	Finnlando 6
Gr. Britujo 20	Jugoslavujo 3
Norvegujo 3	Ĉeĥoslovakujo 33
Germanujo 48	Francujo 31
Polujo 4	Usono 5

La eldonaĵoj en Esperanto de la Int. Lab. Of. enhavas:

4 flugfoliojn, klarigantaj la celojn de Internacia Organizo de la Laboro kaj la verkon de la tri unuaj konferencoj;

komunikojn al la gazetaro, enhavantaj informojn pri labordemandoj internaciaj kaj la verko de la Oficejo (Ĉi tiuj komunikoj estas sendataj ĉiusemajne al la ĉefaj naciaj kaj internaciaj gazetoj, aperantaj en Esperanto);

bultenon de 4 paĝoj, eldonata dumonate, en la formo de aldono al la gazeto „Esperanto“; la unua numero de ĉi tiu aldono aperis en februaro.

Utopio.

Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis el iu germana urbo fotografajon, sur kiu estas videblaj i. a. forte kaj energie aspektanta junulo kaj simpatia fraŭlino, ambaŭ portantaj Esp. stelon, kiuj intencas fari piede vojaĝadon tra la mondo. Alia junulo, troviĝanta sur la foto, aldonis ĉi-sekvantajn leteron kaj manuskripton, kiujn ni publikigas precize laŭ la originaloj, sed forlasante la nomojn.

La Esperantistoj kiuj estas signifas sur la bildo volas fari vojaĝo piede tra la mondon. La vojaĝo estas intencas en formo „Propagandvojaĝo“. Sinj. J. estos la ET ĉiam per vojaĝinformaĵojn provisi. Krom tio fariĝos fotoakceptaĵoj kiuj de nia preparos kaj ol lumbild-parolado trovi uzado. Ni tenas subieno per vian gazeton en redakcie maniero en la intereso de la Esperanto-propagando por utila. Nia intenco iras tien, kartojn por Esperanto-surpreso eldoni, kiuj post kiam alskribaĵoj de So. J. en la ET aperos, volonte aĉetos kaj por nin ol subtenofondo difinita. Sinj. J. estas nacia ekonomia kaj socialpolitika lernita kaj bona porolanto. Fraŭlino S. estas ankaŭ bona propaganda-forto. Ni estas de la opinio, ke la Esperanto-mondo ĉiam per granda intereso la daŭradan vojaĝon persekutas kaj espere, ke Sinj. T. Jung, iu ĉi grandioza rondvojaĝo la kolonojn de la gazeto ET nia doniĝas al la dispono. Ĉiuj alskribaĵoj de la gazeto ET kaj la Esperantistojn sendi nur al Sinj. M. N. F. Hungara Esperantistoj invitis jam Frl. S. kaj So. J. por kelkaj tagoj resti.

per preferinda altestimio.
Korespondanto M.

Manuskripto.

Mondvojaĝantoj Esperantistoj.

Por la kumuna Sento de la Esperantistaro por Esperanto la propagando veki kaj plialtigi, igas nia amikoj piedvojaĝo tra la mondon. La nombro de la anoĵ ĉi tiu universa Lingvo estas daŭrada plialtigi, en multaj urboj fondiĝas grupoj. Ĉiu laro venas delegitoj al mondkongreso el ĉiuj partoj de la tero, por doni respondeco pri la disvolvo de la movado en sian landon. Nia „Mondmigrantoj“ vizitis ĉiuj Esperanto-grupoj kiuj estas je la vojo kaj daŭrigi informoj informiĝi la interesajn legantojn pri ĉiuj paŝoj kiuj fariĝas nia amikoj. Fotografara akceptaĵoj alportos sciigo de societema kunveno kun grupoj kaj belegajn pejzaĝen regionojn. Ni petu ĉiujn Esperantistojn, oflistaristoj kaj amikoj de la movado niajn Vojaĝantojn subteni per konsilo kaj fero. Por la financo de la Vojaĝo ni eldonas artpresaj portretoj de nian „Mondmigrantojn“ la grupojn (ne unuope) por la prezon po peco 1/2 svis. frank por bon-valutaj landoj; por malbonvalutaj landoj 1000 germ. Markoj kontraŭ antaŭpago. Libervolaj kotizaĵoj subkuŝas neniom altlimo. Mendo:n al Sinj. M.

min, ĉu mi kompatas la malsaĝulojn, kiujn oni devas transporti en la alian mondon, por ke tio servu kiel ekzemplo, — mi metas mian manon sur la koron kaj malkaŝe diras: Kompaton por ili mi tute ne sentas. *Ni* ne mortpafas ilin, ili mortpafas sin mem — propravole, ĉar ili scias antaŭe, kio okazos, se la freneza ideo forkuri kaptas ilin. (*Rigardante la poŝhorloĝon*.) Ankoraŭ dudek-tri minutoj pasos, kaj vi spertos la efikon. Kaj se vi deziras, vi povos vidi la spektaklon. (*Li montras la korton per la mano.*) Vi povas esti spektantoj starante ĉe tiu ĉi fenestro. Jen la muro, antaŭ kiu ili starigos lin. Se vi kuraĝas, vi povos vidi ĉion. (*Al la unua soldato.*) He, Pichot, ĉu vi deziras vidi ĝin?

Unua soldato. Mi prefere restas kuŝanta tie ĉi, kun via permeso. Mi ne ŝatas tiajn vidaĵojn. Serĝento Petit. Hontu! Ĉu vi estas soldato de la Granda Armeo?

Unua soldato. Ne ofendiĝu, serĝento, oni ja povas esti soldato de la Granda Armeo kaj tamen ne ŝati tian spektaklon.

Serĝento Petit. Ĝi apartenas al la metio. Imagu, ke vi mem apartenas al la taĉmento, kiu devas mortpafi tian forkurinton!

Serĝento Petit. Ĝi apartenas al la metio. Imagu, ke vi mem apartenas al la taĉmento, kiu devas mortpafi tian forkurinton!

Serĝento Petit. Sensencaĵoj! (*Al la dua soldato.*) Kaj vi? He, ruĝharulo! Ĉu vi deziras vidi ĝin?

Dua soldato. Ne, mi ankaŭ ne, serĝento. Serĝento Petit (*mokimitante lian voĉon*). „Ne, mi ankaŭ ne, serĝento!“ — Kaj ankaŭ vi estas soldato de la armeo de Napoleono!? Kaj vi akompanos lin al Rusujo por malsovaĝigi tiun urson!? Pal (*Al la tria soldato.*) Kaj vi, numero tria?

Tria soldato. Ankaŭ mi ne, serĝento.

Serĝento Petit (*mokimitante lian voĉon*). „Ankaŭ mi ne, serĝento!“ Kiaj herooj! Oni tuj vidas el tio, ke vi ankoraŭ neniam partoprenis grandan batalon kiel mi. Mi partoprenis: Wagram, Austerlitz kaj tiel plu — kaj post tiaj travivaĵoj

Ni petu vin la aldonaĵa portreto ankaŭ doni en preso! Urĝo! baldaŭ aperigi deziras, ĉar jam estas survoje la „Mondmigrantoj“ de 12. 8. 25.

Laŭ la fotografiaĵo, la du mondvojaĝantoj estas idealistaj ĝejnuloj (supozeble ĝefianĉoj), sed ili ŝajnas trofaksi la gastigemon kaj la monujon de la Esperantistoj kaj malrotaksi la multegajn malhelpojn, kiuj minacas mondvojaĝantojn. Se ili fakte jam estas survoje, ili verŝajne ne venos malproksimen. La du nederlandaj Esp. mondvojaĝantoj, pri kiuj ni parolis jam kelkfoje, kaj kiuj estas veraj gigantoj, jam ne scias, kiamaniere venki la malfacilaĵojn. Kiom pli da malfacilaĵoj kaj embarasoj trovos junulo, kiu kun sia amatino volas imiti ilian ekzemplon!

Eble la ĝejnuloj imagas sian vojaĝon triumfojaĝo tra Eĉeno; eble ili opinias, ke en ĉiu urbo kaj vilaĝo la Esperantistoj akceptos ilin kun vaste malfermitaj brakoj kaj ankoraŭ pli vaste malfermita monujo; eble ili kredas, ke la loĝantaro de la regionoj, kiujn ili tramigris, kunerapidos por auskulti el ilia buŝo la novan evangelion de l' Esperantismo. Sed la mondo estas realista; eĉ la Esperantistaro fariĝas realista, kiam oni postulas de ĝi realan subterion (kompreneble ekzistas esceptoj). Kaj kio fariĝos, se al la ĝejnuloj aŭ al unu de ili (al la knabino) okazos io homa, ekz. malsano, akcidento aŭ io simila?

Tute speciala ĉapitro estas la por-Esperanta, propagando, kiun laŭdire faros la mondemigrantoj. Ekzistas lokoj, regionoj, eĉ tutaj landoj, kien la kulturo ankoraŭ ne penetris, kie la apero de Esperantistaj mondemigrantoj povos fari seriozan impreson; sed en la plej multaj lokoj illa apero povos nur ridindigi aŭ malestimindigi nian movadon, tiom pli, se la propagandistoj scipovas Esperanton ne pli perfekte ol la skribinto de supre, presita letero, kiu funkcias kiel korespondanto por la migremaj ĝejnuloj.

La afero estus tute alia, se iu grava Esp. gazeto, ekzemple ET, kiam ĝi havos 10 000 abonantojn, povus sendi tra la mondo, je la propraj kostoj de la gazeto, iun specialan kunlaboranton, kiu perfekte scipovas Esperanton kaj kiu de ĉiu interesa loko sendus raporton kaj fotojn por kliŝoj kaj dum sia vojaĝo farus en ĉiu lom grava urbo — se ne en frako kaj ameliĵa ĉemizo, sed almenaŭ en konvena vestaĵo — paroladon en Esperanto, eventuale kun lumbildoj.

Volonte ni helpus al la kuraĝaj ĝejnuloj realigi sian idealan songon; sed tio estas tute neebla. La ideo pri komuna mondemigrado de geamantoj ja havas ion allogan, vere romantikan, eĉ kortuŝan; sed ĝi estas utopio. Tion niaj junaj gesamideanoj baldaŭ spertos. Ĉiukaze ni deziras al ili feliĉon esperante, ke la baldaŭa vekiĝo el la bela iluzio ne estos por ili tro doloriga.

Kongresoj pentekostaj.

La 14-a Brita Kongreso de Esperanto

okazinta en Bournemouth, suda parto de Anglujo, dum la pentekosta semajno, estas alia mejlŝtono, kiu markos la progresvojon de Esperanto en Britlando.

Nur ĉirkaŭ 170 samideanoj ĝin partoprenis, kvankam 250 subtenis la kongreson per aĉeto de kongres-biletoj. La foresto de multaj entuziasmuloj povas esti klarigata nur per la fakto, ke longa distanco disigis la kongresan urbon de la mezlandaj kaj nordaj urboj, kie kuŝas la forteco de nia movado en Anglujo. Kelkaj konstantaj pilgrimantoj de kongresoj forestis pro privataj kaŭzoj kaj multokupiteco, fakto pri kiu memorigis ĉiu ĉeestanto.

Kiel dum la lastjara kongreso en London ankaŭ ĉi-jare la kongresaj organizantoj invitis D-ro'n Privat el Geneve al la kongreso, kaj lia ĉeesto sendube multe helpis la propagandan flankon. Liaj du longaj kaj flujaj paroladoj en nia lingvo, la unua pri la Ligo de Nacio (vendredon vespere) kaj la dua pri la Esperanta movado ĝenerale

^{*)} Ilustraĵo pri la kongreso aperos en venonta numero.

(sabaton vespere), longe restos en la memoroj de la aŭskultintoj.

La malfermo de la kongreso estis aranĝita vendredon vespere la 18-an de malo sub la aŭspicio de la unuigo por L. de N. kaj prezidata de lia urbaestara moŝto Alderman C. H. Cartright, kiu bonvenigis la kongresanojn. Bonvenon prezentis ankaŭ la prezidanto de la loka ĉambro de komerco s-o F. W. Baker. Ambaŭ parolis tre kuraĝige kaj favore pri nia movado. Pro iu miskompreno kaj pro nealveno de s-o Merchant, prez. de Brita Esp. Asocio, kiu devis oficiale malfermi la kongreson en la nomo de la Brita Esperantistaro, tiu honorinda devo transvenis al la skribinto de tiuj ĉi linioj.

Sabaton p.m. okazis la jarkunveno de Brita Esp. Asocio, kiam oni aprobis la jaran raporton, la bilancon kaj raportis pri la rezulto de la baloto por la nova oflistaro. S-o John Merchant unuanime restis la elektita prezidanto, kun malmultaj ŝanĝoj inter la cetera oflistaro. Vespere okazis propaganda kunveno kun D-ro Privat kiel ĉefa paroladanto (jam aludita antaŭe). La dimanĉa di-servo, diversaj ekskursoj, sociala kunveno, komuna tag-kaj te-maĝo kaj dancfesto estis aranĝitaj kiel kutime en antaŭaj jaroj, kaj tiuj plene sukcesis laŭ ĉiuj vidpunktoj.

La kongreso oficiale finiĝis mardon vespere per ferma kunveno, kiu havis la formon de improvizita koncerto. Novaj preparitaj kaj improvizitaj kantoj ĝuigis la malgrandan rondon familian, kiu ankoraŭ restis ĝis tiam, kaj kiu disigis per varmaj manpremoj kaj ĝajaj adiaĵoj ĝis la 15-a proksima kongreso.

Lokaj ĵurnaloj plene raportis pri la kongreso, kaj unu semajna ĵurnalo eldonis specialan ilustritan numeron kun plenaj raportoj pri la kongreso kaj la movado ĝenerale.

J. D. Applebaum.

Esperanto-tagoj en Potsdam.

La „Märkisch-Pommersche Esperanto Verband“ kaj Esperanto-Gruparo Berlin aranĝis dum pentekosto en Potsdam Esperanto-tagojn, kiuj estis bone vizitataj kaj kies programo estis tre ampleksa.

Sabaton la 19. majo, je la 2-a. aro da gesamideanoj, inter ili gastoj el Lübeck, Stettin, Halle a. S., Dresden kaj eĉ el Japanujo D-ro Fusiŝava de la Ligo de Nacioj en Geneve, renkontiĝis antaŭ la stacidomo en Potsdam, por unue viziti la observejojn sur Brauhausberg. — Prof. Brückmann, en la nomo de la bedaŭrinde forestinta Prof. Schmidt, en Esperanto salutis la ĉeestantojn, poste montris al ili la diversajn meteorologiajn instrumentojn kaj fine gvidis ilin sur la turon de la magneta observejo, de sur kiu oni havis la plej belan rondrigardon sur Potsdam kaj ĝiaj arbaroj kaj lagoj kaj eĉ povis ekkoni malproksime sur la horizonto la turojn de Berlin kaj Spandau. Poste oni vizitis la astrofizikan observejon, kie la direktoro, Prof. Ludendorff, frato de la fama ĝeneralo, vidigis al ni en la granda kupolo la grandan teleskopon („Grosser Refraktor“), kiu estas unu el la plej famaj en la mondo kaj enhavas la plej grandan objektivon, kiu ekzistas, nome diametron de 80 cm. Tiuj ĉi vidindaĵoj, kiujn eĉ multaj potsdamanoj ne jam vidis, freege interesis la gasteojn, kaj ni ŝuldas multan dankon al nia hon. prez. D-ro Prof. Schmidt, kiu ebligis al ni tiun viziton.

Vespere je la 7-a okazis en la urba real-gimnazio arta propagand-vespero, kiu malgraŭ la pentekosta festo estis bone vizitata. D-ro Burkhart majstre ludis fantazion laŭ motivoj de Wagner kaj paroladis pri la temo „La lingvo kiel artoĵo“, kaj D-ro Ellerbeck donis poste detaliajn klarigojn pri Esperanto. F-inoj Vierth kaj Nickel kanis duetojn kaj ariojn parte Esperante, parte germane; kiuj ankaŭ multe plaĉis al la ĉeestantoj. S-o Markau oficiale ekzamenis siajn ĝelearnantojn el la lastjara kurso kaj per loto disdonis premiojn al ili. Mallongaj salutiparoloj de la ĉeestintaj eksterlandaj samideanoj el Anglujo, Polujo, Rusujo kaj Japanujo finis la propagand-vesperon, kiu havis vere artan sillon.

Pentekostan dimanĉon, antaŭtagmeze, okazis kunveno de „Märk.-Pomm. Esp. Verband“. Bedaŭrinde la organizo en la provincoj Brandenburg kaj Pommern ne pliboniĝis, kaj oni konstatis, ke multaj provincaj grupoj ne sekvis la vokon je aliĝo. Espereble la venonta ligo kunveno, kiu verŝajne estos en Stettin, donos pli bonan rezulton.

Posttagmeze la gesamideanoj vizitis la parkojn de Sanssouci kaj „Nova Gardeno“, ĝuis la belegan perspektivon de la „Pfingsberg“ kaj vespere renkontiĝis en ĝaja senĝena kunveno en la klubejo „Reichsgraf von Hoditz“.

Pentekostan lundon ni denove kolektiĝis por ekmigr. Post vizito de la ĉarmaj parko kaj kastelo Babelsberg, ni gvidis niajn gasteojn tra la bela printempa arbaro laŭlonge de la Griebnitz- kaj Stolpa-lagoj al Wannsee, kie niaj eksterurbaj gesamideanoj diris „adiaŭ“ al ni, dum la berlinaĵ kaj potsdamaj Esperantistoj pasigis la finon de la Esperanto-tagoj en komuna kaftrinkado en „Kohlhasenbrück“ apud Potsdam. Multon ni montris al la partoprenintoj dum tiuj ĉi tri tagoj kaj ni esperas, ke ĉiuj estas plene kontentaj, kaj ke la ne-partoprenintoj, legonte nian raporton, des pli multe bedaŭros sian foreston.

H. Nickel.

Diversaĵoj.

30 milionoj forĵetitaj.

Ĵus alvenis ĉe mi poŝtkarto el Bydgoszcz (Bromberg) kun sekvanta Esperante skribita teksto:

Bonvolu deskribi kaj sendi al 9 personoj, al kiuj vi deziras feliĉon. Tiu ĉenon komencis amerika oficiro, Major Musior. Trifole tiu ĉeno estas ĉirkaŭironta la mondon. Granda malfeliĉo minacas al tiu, kiu ne daŭrigas tiun ĉenon. Sendu 9 leteretojn dum 24 horoj! Post 9 tagoj vi havos grandan feliĉon.

Ĝis nun ricevis 112 029 personoj kaj Malachowski al kapitano Zabloski Zabloski al kapitano Krajewski Krajewski al Biedl Biedl al Jawski Jawski al Dmowski Dmowski al Gerda Maehle G. Maehle al Heddý Maehle H. Maehle al Caesar Neumann C. Neumann al Mary Brauer M. Brauer al Nordert Scheerschmidt N. Scheerschmidt al Teo Jung.

Ne havante tempon deskribi naŭfoje la tekston, sed ankaŭ ne volante havi malfeliĉon, mi uzas la plej modernan manieron kaj represas ĝin, per tio ĝin transdonante al ĉiuj 3500 aŭ pli da abonantoj de ET. Post 9 tagoj mi atendas eksterordinaran feliĉon (se eble tujan dekolobigon de la abonantoj), ĉar mi transdonas la tekston ne nur al 9, sed eĉ al preskaŭ 4000 personoj, al kiuj mi deziras feliĉon.

Konsiderante, ke jam pli ol 100 000 personoj ricevis la tekston kaj skribis afrankitan leteron aŭ poŝtkarton, oni povas kalkuli la sumon forĵitan por tia „serioza“ propagando per Esperanto je minimume 30 milionoj da germ. mk., kiujn oni prefere estus doninta al UEA aŭ alia grava institucio.

T. J.

Telegrafo sen fadeno.

En Belgujo. Interesa juĝo.

Laŭ artikolo 2-a de la leĝo de 10. Julio 1908, instalo aŭ instaligo de aparato de senfadena telegrafo, kiu povas servi aŭ malutili la korespond-

Flugfolieto.

1. Junio.

Ĉu vi scias, ke ankaŭ la manoj kapablas paroli? Benataj estu la manoj delikataj, sentemaj, toleremaj, kiuj respektas la proksimulon ne juĝante laŭ si mem, sed penante kompreni la aliajn. Ni Esperantistoj havu manojn delikatajn, disdonante kaj akceptante. Disdonanta mano povas esti ankaŭ maldelikata. Ne altrudu! Ne ĉiu volas esti donacata, ne ĉiu volas esti eĉ laŭdata; almenaŭ ne de ĉiu. Sed ĉiu volas esti komprenata! — Niaj manoj do zorge esploru la sentaron kaj karakteron de nia proksimulo antaŭ ol ni donacas kaj laŭdas. — La delikateco de akceptanta mano apartenas al la plej belaj fenomenoj de l' vivo. Ni distingu akceptante. Ne timu, ke oni vin opinios sendanka, **se vi ne tuj abunde (sed plej ofte senkore) surŝutas la donacinton per vortoj de danko**; tiaokaze li nur pensos, ke li donis tro multe, kaj vi perdos lian estimon. Pruvu per agoj, ke vi meritas la donacon aŭ la laŭdon. Ne atendu donacojn kiel almozulo, ne estu ambicia je laŭdo. La gloro forkuras de tiu, kiu ĝin serĉas. Via gloro estu, ke vi faris vian plej bonan.

Ho delikataj manoj! Kiom riĉa estas via esprimkapablo! Pli riĉa ol la plej riĉa lingvo. Per delikataj manoj ni donacu ankaŭ nian trezoron, nian Esperanton. Pli bone estas varbi unu veran homon ol milion da malveraj, kiuj poste per maldelikataj manoj detruos tion, kio ne estas laŭ ilia naturo.

Saĝaj kaj bonkoraj estu niaj manoj. Ilin etendante ni ĉiam imagu, ke ni karese estas tuŝontaj infanetojn amatajn. Delikataj manoj neniam kaŭzas doloron, ili ĉiam kaj ĉion benas.

Benataj estu la delikataj manoj!

Z.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Britujo.

La 18-a Skota Kongreso okazos la 15.—17. 6. en Greenock. Aliĝiloj haveblaj de s-o W. J. McMurren, 3 Ford Place, Finnard Street, Greenock.

La proksima konferenco de Sud-Orienta Federacio okazos la 22. 9. en Croyden. Al la Federacio aliĝis ĝis nun 15 grupoj.

Brita Okc. Hindujo (Ameriko).

Sur la Antilaj Insuloj nia movado ekfloras. En kelkaj ĉeflokoj de la diversaj insuloj ekzistas fervoraj Esperantistoj, kiuj klopodas tertrifali por fondi Esp. rondon. Jam finiĝis kursoj, kaj ankaŭ multaj personoj studis private nian lingvon.

D. W. B.

(Rim. de red.: Plezure ni akceptos detaĵojn pri la movado sur la Antiloj, eble de antilanoj mem.)

Hindujo.

Hinda Esp. Societo („Hindusthan Esperanto Sabha“) estas fondita en Delhi de Prof. Gopalji, lektoro ĉe la universitato.

Germanujo.

Esperanto-Gruparo Berlin.

La 28. 4. okazis en Berlin la 1-a ekzameno pri sciencapedagogia kapableco, sub la direkto de s-o Tel. Dir. Behrendt; la tri aliajtaĵ ekzamenitoj sukcese trapasis ĝin.

La 17. 5. okazis en la hejmo de „A. E. G.“ (Allgemeine Elektrizitäts-Gesellschaft) por ties oflistaro propagand-parolado pri Esperanto. Parolis D-ro Burkhart pri „la lingvo kiel artoĵo kaj la artefarita lingvo“ kaj patentadvokato Schiff pri „Esperanto kaj inĝeniero“, antaŭ ne tro granda, sed tre interesiĝita aŭskultantaro.

La 15. 5. oni dum la monata grupar-kunveno aranĝis „Dialekt-vesperon“, kiu tre ĝojigis la multnombran ĉeestintaron. En interesa maniero D-ro Burkhart parolis pri la diversaj dialektoj en la germana lingvo, kaj sekvis deklamoj en berlina, brunsviga, silezia, frankfurta, platgermana ktp. dialektoj. En la venonta kunveno, kiu okazos la 19. 6. je 7.30 h. en la hejmo Kurfürstenstr. 11, interale D-ro Hanauer parolos pri la unuaj internaciaj kongresoj. Ankaŭ D-ro Fusiŝava promesas partopreni. En- kaj eksterlandanaj gesamideanoj, trapasontaj Berlinon, estas kore invitataj.

La 19. 5. ĉeĥa Esp. karavane de junaj studentoj vizitis Berlinon, gvidata de s-o Schwaiger, del. de UEA. Per

adon, estas malpermesita, krom se oni ricevis antaŭan konsenton de la registaro. Iu loĝanto de Gent starigis en sia hejmo ricevan aparaton nepetinte la permeson de la ministro de Fervojoj, Poŝto, Telegrafo kaj Maraferoj. Pro tio li estis juĝe persekufata. La juĝistaro senkulpigis lin, ĉar la instalaĵo ne enhavas aliajn aparatojn krom ricevajn. El la ĉefaj motivoj de la juĝo ni notas: „Konsiderante ke tiuj ricevaj aparatoj ne povas servi la korespondadon, ĉar kiu diras »korespondado« parolas pri interŝanĝo de signaloj inter du postenoj, kiu estas ebla nur kiam la du postenoj estas elsendaj; ke tiuj aparatoj ankaŭ ne povas malutili la korespondadon, ĉar por malutili oni devas elsendi radiojn, kaj ke tio ne estas ebla per la ricevaj aparatoj.“

Wiena palaco por loĝado.

Kiel ĉie, ankaŭ en Wien estas grave sentebla la malmulteco da loĝejoj. Tial akcelas ankaŭ tiu komunumo ĝin detrai per konstruado de domoj aŭ mem aŭ per la loĝantoj. Nun ĝi prefigas domon, kiun mi volas priskribi, ĉar ĝi ne estas kazerno sed palaco. El grnda sunobrilata, ornamita korto kun sabluludejo kaj ripozbenkoj kondukas dek ŝtuparoj supren. Dum vintro la infanoj uzas vastan halon por ludado. La vasta, de ok familioj samtempe uzebila lavejo posedas malvarman kaj varman akvon, elektrre funkcigatajn maŝinojn, sekigilejon, elektran kalandrilon ktp., tiel ke ankaŭ grandaj familioj povas lavi en tri horoj. Ĉeestas ankaŭ banejo kun duŝoj kaj kuvoj. La palaco enhavas 211 loĝejojn: 16 malgrandaj konsistantaj el nur unu ejo, 50 havantaj loĝokuir-ejon kaj unu ĉambron, la ceteraj enhavas da ĝis kvar ejojn. Ĉiuj posedas kloseton kaj gargarejon, gasokuirilojn kaj elektran lumon.

La domo estas konstruata, kiel diras klariga tabulo: per impostoj por konstrui loĝejojn por malgrandigo de la loĝadmizero kaŭzita per la miliito.

Dr. Moriz Topolansky.

aŭtomobiloj ili vizitis la urbon kaj la magazenojn, havis komunan tagmanĝon en Wilhelmshof kaj vespere je la 7-a daŭrigis la vojaĝon al Haag *H. N.*

En Planitz (Saksujo) fondiĝis nova laborista Esp. grupo kun du rondoj por progresintol kaj komercantoj, kies prezidanto s-o Albert Richter ĉefe instruas junajn ministrojn en la profesio-lernejo. Adreso: Niederplanitz, Saksujo, Poŝtstr. 6 ll.

Polujo.

Bydgoszcz. Esp. ekzameno okazis la 29.4. De 8 kandidatoj faris ĝin: 4. kiuj ricevis diplomon pri „lingva kapableco“; krom tiu akiris blindulinstruisto Głowoczynski diplomon pri „insirua kapableco“. Ekzamenis prof. L. Kronenberg en ĉeesto de s-oj dir. Chmielewski kaj Prengel, prez. de la loka „Societo Esp“.

Łódź. Dum Pentekosto, la 20. kaj 21. de majo, okazis sukcesplena konferenco, organizita de la tulpollanda laborista societo Esperantista „Laboro“ (Warszawa.)

Lublin. La 14.4.en salono de Lublina Konsum-kooperativo s-o J. Zawada faris sukcesan paroladon pri „Esp. kaj ĝia nuna stato en la mondo“: ĉeestis ĉ. 100 personoj. — S-o Cz. Pruski, del. de UEA, gvidas elementan kurson. — Loka gazeto „Ziemia Lubelska“ ofte prezigas priesp. artikolojn.

Milooalaw. Influe propagandas inter poŝtistoj s-o poŝtestro Prabucki, sukcesanta publikigi fervorajn artikolojn en preskaŭ ĉiu n o de la tulpollanda oficiala-deviga organo poŝtista „Poczta“. Dank' al tio la mondlingva ideo almenaŭ funde enpenetras la mediojn de la ĉ 50000 polaj poŝtoficistoj kaj jam hodiaŭ oni povas diri, ke fakte la poŝtistoj apartenas al la Esperanton piej multe favorantaj profesiuloj de Pollando.

Poznań. Dum la lasta Poznań'a foiro okazis la 28. kaj 29.4. konferenco de la „Pola Esperantista Societo“ en la ĉambro de „Collegium Minus“ de la Universitato.

Warszawa. En „Pola Esp. Societo“ faris s-o Prof. M. Kaus prelegon pri „Psihologio kaj Esperanto“.

Katovice (Supra Silezio). Dank' al propagando de a-o A. Kobiliński malfermiĝis filio de Varsovia „Pola Esp. Societo.“ *Pola Esperanto Servo.*

Literaturo.

Faŭst.

(2-a daŭrigo.)

La 24-an de junio 1794 Goethe ekdecidis ŝnverki la Faŭst-dramon kaj doni al ĝi la definitivan formon. Mi jam atentigis pri tio, ke precipe Schiller instigis Goethe'on ree prilabori la flavigintan manuskripton el sia ĵunaĝo. La saman tagon li verkis la „Dediĉo“. Antaŭ la spirita okulo de l' poeto glitante preterpasas personoj amataj kaj ŝatataj en pasintaj tagoj kaj ilin li salutas eklore.

En la „Antaŭludo“ li skizas la karakteron de l' tragedio. (Estas tre bedaŭrinde, ke la tradukinto ne tradukis ĉi tiun tre valoran parteton, kies psikologia karaktero nepre postulis specialan atenton.) Hindaj studoj instigis Goethe skribi tiun antaŭludon. En ĝi la teatrodirektoro prezentas la realiston, la teatropoeto parolas pri idealismo kaj vera arto; ambaŭ interdiskutadas kaj tria persono, la t. n. „gala persono“, ludas la rolon de peranto inter ambaŭ. La du unuaj personoj signifas la junan kaj la maljunan Goethe i. e. ties opiniojn; la ĝajulo estas duona meŝtisto; el la diskuto rezultas Faŭst. La tuta estas psikologia majstraĵo.

Por la „Prologo en Cielo“ la poeto ĉerpis la materion el la libro de Hiob (Biblio). La ideo de l' dramo tie komenciĝas en la ĉielo. El interpolado inter Dio kaj la diablo (meŝtisto) evidentiĝas la enhavo de l' dramo. Dio permesas al Meŝtisto, ke li gvidu Faŭst'on surtere, bone sciante, ke eĉ la eraranta kaj pekanta homo spite ĉiujn tentojn ree trovos la ĝustan vojon. Efektive Dio ne malamas la diablon; li ne neas, ke homo ne tenita nur vegetadas sed ne vivas, kaj ke pro tio incitante forto lin multe utilas. — Jen la ŝlosilo por la tragedio. — Ĉi tiu trilogio konatigas formon kaj ritmon de la realeco, de ĉio surtera, triobla pordo enkondukanta en la komencan parton de la tragedio mem.

Ekparolas Faŭst sidante sur apogseĝo apud pupiĥro en alta volbita, malvastaj gotika ĉambro.

Studojn mi, ha! de flizolfi,^{*)}
Jurista art' kaj medicin'.
Kaj ankaŭ, vel teologi'i
Kun arda pen' pritraktis ĝis fin'.
Jen staras nun mi malseĝul'i
Kaj mia saĝo estas nul'.

La unuaj scenoj de l' parto unua estiĝis el malkontento kaŭzita pro la malklereco de la tiama tempo (mezepoko), kie ĉie regis vigla exploremo, sed nenie reala, profunda scio. Faŭst (*alias* Goethe) intencas enpenetri en misterojn de la naturo ĝisradike. Li abomenas la arlekenan profesorecon. Nur supraĵo, ŝajno estas ĉio, sed profunda penso dormetas sub la supraĵo. Ĵus, naaskiĝis en Goethe la ideo de l' evoluo, kaj li igas Faŭston aŭtensenti tiun progreson de l' naturscienco. Faŭst konfirmas al si mem

Versa Aboco.

Aboco estas Esperanta.
B estas sono konsonanta.
Ĉejano portas bluan floron.
Ĉielo havas blukoloron.
Decembro estas neĝmonato.
Edzino zorgas pri saĝato.
Fakiro preĝas en silento.
Gazelo timas pro serpenito.
Ĝardenon fosas ĝardenisto.
Hardingo*) revas pri la vizio.
Ĥemio estas la scienco.
Idlistoj agas kun tendenco.
Jasmeno kreskas en terpolo.
Ĵurnalon legas patrioto.
Kosmoglotistoj ne prosperas.
Leono ŝercan ne toleras.
Maleste staras Muro Ĉina.
Nürnberg estas la Dekkvina.
Orĉeron portu elegante!
Parolu ĉiam Esperante!
Rozoleistoj multe riskas.
Soveta regno ja konflikkas.
Ŝipeto tras vojon alian.
Tui mondo ŝatas lingvon nlan.
UEA zorgas pri renomo.
Uŝaĝo estas pseŭdonomo.
Virginon ĉastan ni adoru.
Zamenhofanoj ĉiam floru. *P. Bibabo.*

*) Persono de la konata romano „Strange heredaĵo“.

En malproksimo.

le en nordo, sur mara bordo
Atendas min blonda knabin'
Ho kruda sorto! Ĉu ĝis la morto
Disigis nin jam la destini'?
Tra monta baro, envia maro
Flugas per veni' la ama seni'
Ho por la paro estas tujjaro
Ĉiu momen' de l' korturment'.
Ĉu venos foje, ke nin jam goje
Kunigos sor'i en hejma kori',
Aŭ senkonsole prenos nin sole
Per frosta for'i bonkora mori'? *Budapestano.*

s'an nescion; libroj estas por li senvaloral, pro tio li sin turnas al la magio. Goethe okupis sin ĉi tie pri la mistikulo Swedenborg (18-a jarcento), kiun li nomas No-tradamo en la tragedio. Kaj Swedenborga mistikismo liveris al li la materion por simbologi sian ideon. S. opiniis aŭ eĉ kredis, ke ĉiu parto kaj mondo de l' Kosmo (makrokosmo) estas regata de estro, kies ĉefestro estas Dio. Por senuvaligi la sekretojn de la mondenigmaĵoj, Faŭst alvokas la e-iron de la Tero, la terspiriton, por ke li helpu lin trovi la solvon tiom pricerbumitan dum multaj, multaj noktoj. Ĉi tiu terspirito donas al li fine serviston, la malbonan spiritan Meŝtisto (Meŝtstofelo). Ne komprenante la terspiriton, al kiu li tute ne similas, li decidas sin mortigi. Goethe nun enŝovas la personon Wagner, kiu male tute ne interesiĝas pri la problemoj faŭstaj. Lin kontentigas la libroj. Kiam Faŭst ekprenas la mortigan venenokalon, eksonas solena paska kanto de anĝeloj. Ne! kantas la ĉielaj spiritoj, ne estas necese, ke ni foriru el la naturo, la naturo venos al ni, kaj en la venonta sceno „Antaŭ la pordego“ ni vidas Faŭst en ĝojo kaj ĝuo tramigri la ekverdigiĝintan naturon. Li ekjubilas:

Kontente ĉiuj aĝoj festas:

Ĉi tie hom' mi rajte estas.

Kvazaŭ filmo ĉi tiu viva sceno preterflugas niajn okulojn. En la viviga naturo Faŭston denove ekkaptas la forta deziro kaj la sopiro forŝiri la sigelon de sur la libro de l' estado. Ne vane li ĝemante vokas. En formo de nigra pudelo (hundo) alproksimiĝas la helpema servisto Meŝtisto kaj sekvas sian estron al ties studejo. *Max Butlin.*

(Daŭrigota.)

Scienco.

Scienca ekspedicio en Tibeton.

Ruslingva gazeto „Narkhune“ (Вѣстник) laŭ sciigoj el Moskvo komunikas, ke rusa Geografia Societo estas organizanta sciencan ekspedicion en Tibeton. La ekspedicio daŭros 3 jarojn kaj estos gvidata de l' konata vojaĝisto kaj esploristo de Mez-Azio P. Kozlov. La elspezojn por la entrepreno, same kiel asekurdo de l' partoprenantoj, pagas la registaro, kiu laŭ decido de l' Sovjeto de Popolaj Komisaroj asignis tiucele 88476 orajn rublojn. *R. L., Tallinn*

Filatelio.

Estonio.

Plua eldono de la nova serio: 1 mark bruna. La bildo sama kiel sur la pm. de 2 kaj 2½ m. (teksistino). La marko estas dentumita. La unua eldono estis nedentumita.)

Rusio.

Unuamaja eldono. Surpreso por oraj literoj: „1. majo 1923. Filatelio al laborantoj. 1 r. + 1 r.“ sur jubilea 10-rubla marko kun ŝtonhakisto (dukolora: bruna-nigra, R. S. F. S. R., 1917—1922). La marko estis vendita nur la 1-an de majo.

R. L., Tallinn.

Novaj sovjetaj poŝtmarkoj.

Estas atendata eldono de nova serio je 1 rublo (kun busto de laboristo), 2 rubloj (busto de vilaĝano) kaj 3 rubloj (busto de ruĝarmeano). *O. N.*

SAT.

Arango de ekzamenoj dum la SAT-Kongreso.

Okaze de la nunlara kongreso de SAT la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, ekzamena komisiono por la provinco Hessen-Nassau kaj la Respubliko Hessen, intencas aranĝi la 11-an de aŭgusto en Kassel jenajn ekzamenojn: 1. pri kapableco, 2. pri scienca-pedagogia kapableco. Demandojn oni direktu al s-o Urban, Frankfurt a. M., Adlerflychtstr. 8. Aldonu afrankajon por respondo!

Al niaj kunlaborantoj.

Estas kompreneble, ke ni sendas al niaj kunlaborantoj de ĉiu numero, kiu enhavas iom gravan artikolon de ili, po 2—12 ekzempleroj, laŭ la graveco de l' artikolo. Kunlaborantoj, kiuj unu monaton post apero de sia artikolo ne ricevas la rekompencajn ekzemplerojn, bonvolu ilin postuli de ni.

Vespero.

De Fritz Sauer.

La sun' malsupreniras,
En ruĝa, ora lum';
Ekbrilas la nubaro,
Kaj tra la brancetaro
Murmuras venta zum'.

Krom tio trankvileco
Regadas ĉie nun.
Pacplene batas koroj, —
Kisaŭl estas floroj
Lastfoje de la sun'.

Recenzelo.

LIBROJ.

NI LEGU! Internacia legolibro, Kompilis Brunulo. Rekomendita de E. L. A. Volumo n o 3 de la kolekto de la Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris (20e), 28, rue Boyer. 104 pĝ. 18 : 19 cm. Prezo ne montrite.

La jam antaŭ kelka tempo eldonitan lernolibron por S. A. T.-anoj sekvis nun ampleksa legolibro enhavanta 40 rakontojn, poemojn kaj humoraĵojn el 15 lingvoj, do rezultate de internacia kunlaborado. La eldonisto diras en la antaŭparolo, ke sendube ekzistas jam multaj legolibroj, sed ke ili havas mankon: ili estas neŭtralaj, dum la spirito de S. A. T. tia tute ne estas. La iniciatinto pro tio kompilis libron, la S. A. T.-anecan idealon apogulantan. — Menciinda estas la zorgemo aplikita en la arango de la legaĵoj: presoj kaj papero estas bonaj, kvankam al mi persone kelkaj el la multaj ilustraĵoj laŭ estetika vidpunkto ne plaĉas. Sed ĉiu fusu sian propran sulkon. — Al ĉiuj S. A. T.-anoj la bonega legolibro eĉu varme rekomendata. *G. Aĵul.*

GAZETOJ.

The British Esperantist, majo. Kun detala raporto pri Venezia. — Aldono „La luna Esperantisto“.

Kristana Espero, mario-junio. Le monde Espérantiste, mario-aprilo.

France-Esperanto, majo. Kun interesa art. „L'Espéranto au Bureau International du Travail“.

Vegetarano, aprilo. Kun aldonita propagandilo „Kio estas vegetara vivo?“

Novaj Tempoj, majo.

Arbeter-Esperantistien, ma'o.

Ho'anda Esperantisto, 19. 5.

Esperantida, mario-aprilo.

Pacifismo.

Dua grandioza manifestado por la paco.

Estis risko de la Komitato „Virinoj, klon vi faras“ lui la plej grandan salomon de Hago kaj por la dua fojo inviti preskaŭ la samajn parolantojn: katolikan monaĥon, superrabenon, protestantan pastron, socialiston kaj min kiel Esperantistinon.

Evidentiĝis, ke la optimismo de la virinoj estis pravigata. La salono estis tute plena kun 2000 interesuloj.

Mi tulkore dankas ĉiujn aprobintojn, ĉar ili ebligis min antaŭ la publiko rakonti, ke mi per alvoko en Esperanta gazeto ricevis pruvojn de simpatio el Germanujo, Francujo, Polujo, Anglujo, Aŭstrujo, Svisujo kaj Nederlando.

La sekvanta manifeste estas tradukita en diversajn lingvojn kaj estos sendata al ĵurnaloj en ĉiuj landoj:

Virinoj, klon vi faras?

Ni starigis komitaton, celantan mobilizi la publikan opinion laŭ la jenaj principoj:

1. Se ĉiuj virinoj de ĉiuj nacioj kaj rangoj unuigis, ili povos havi grandan potencon.

2. Ili devas ekkonscii, ke ĉiuj konfliktoj inter la ŝtatoj devas esti solvataj per juĝado anstataŭ per bruta forto. Kunlaborado, amo al proksimuloj, rajto estas pli bonaj fundamentoj por la homaro ol majamo kaj perforto.

3. Ni deziras Ligon de Popoloj de ĉiuj landoj.

Du imponantaj kunvenoj, kie parolis eminentaj oratoroj de diversaj religioj kaj opinioj pruvis, ke la popolo jam maturiĝis por la paca principo.

Nun ni direktas nin al la eksterlando. Fratinoj en ĉiuj landoj aliĝu al unu granda ligo!

Protektu viajn infanojn kontraŭ bruta forto! Eduku ilin al rajto kaj homamo.

Milonoj da viroj samoplinas kun ni. Ni ne plu toleros, ke bruta forto regos; ni devas agi! Ankaŭ ne-esperantistoj sendu sian aprobon al

Julia Isbrücker
v. Beverningkstr. 10
Hago-Nederlando.

Internacia Sporto.

Boksado.

Batalo pro la eŭropa majstreco.

En Milano la 20. 5. Ermilno Spalla el Casale Monferrato (Piedmonto) venkis la nederlandanon Piet van der Veer post 20 rondoj, laŭ poentoj. La venko estis penega: la batalo daŭris 80 min., el kiuj kvarono por paŭzoj. — Santiago Mario Bosioio, ankaŭ tre malfacile, sukcesis venki laŭ poentoj post 10 rondoj Karel Bisschop. Male, Spalla Giuseppe, frato de la unua venkinto, jam dum la unua rondo devigis Herman Slouwerman, post fortaj atakoj sangantan kaj refalintan sur la limŝnuroj, al malvenko, pro ĵeto de l' sponĝo. — Nollnde por Esp. sportistoj estas, ke la intervjuoj de ĵurnalistoj kun s-o van der Veer estis tute mual, ĉar tiu sportmajstro konas nek Esperanton nek aliajn fremdlingvojn kaj la italaj ĵurnalistoj ne ŝatas tiun „friguezulo“ Esperanto, preferante intervjui . . . per gestoj.

Piedpilko.

Internacia piedpilka kongreso okazis dum pentekosto en Genève. Por la venontaj kongresoj oni provizore elektis la urbojn Paris por 1924, Milano 1925, Madrid 1926 kaj Helsinki 1927.

Pri la 13-a germana gimnastika festo en München.

La 14.—21. julio 1923 okazos en München la 13-a germana gimnastika festo, kiu jam nun promesas fariĝi la plej granda ĝis nun okazinta en Germanio kunveno de sportuloj. La ĝisnunaj aliĝoj superas ĉiujn, eĉ la plej grandajn atendojn. Oni kalkulis je maksimume 30—40000 partoprenontoj, sed jam nun aliĝis 125000 personoj, inter ili 23000 virinoj. El la eksterlando ĉeestos 6000 sportuloj.

Dum la festo okazos festprocesio tra la urbo, al kiu anoncis sin 80000 personoj kun 1030 standardoj kaj 30 orkestroj. Al la ĝeneralaj ekzercoj sen ilaro, la plej bela okazaĵo dum tia festo, aliĝis jam 34000 viroj kaj 6000 virinoj. La dekdu-batalon, kiu estos la ĉefkonkuro de l' festo, partoprenos 4000 sportuloj. Pile okazos konkuroj en kurado, saltado, skermado, luktado kaj naĝado.

Estas kompreneble, ke oni por tia grandioza sportifesto ankaŭ bezonas grandegan stadion. Sed pro manko de tia ega sportejo, ne nur en München, sed en tuta Germanio, oni nun estas konstruanta, sole por la gimnastika festo, provizoran stadion sur la Theresien-herbejoj, kie ĉiujare en oktobro okazas la konata oktobro-festo kaj kie estas loko por 500000 personoj.

Samtempe kun la festo estosarangata ekspozicio de ĉiuj iloj, kiuj rilatas al gimnastiko, ludo kaj sporto en la München'a ekspozicio.

Joh. Bernhard.

Alvoko

al la Esperantistoj Stenografistoj.

Kelkaj gekolegoj — Esperantistoj kaj stenografistoj — formis provizoran komitaton, por cell la kreon de Internacia Asocio de Esperantistoj Stenografistoj.

Tiu asocio laboros por propagandi Esperanton en la stenografistaro, kaj stenografion en la Esperantistaro. Ĝi zorgos same por instrui la junajn kolegojn, kiuj volos stenografi la internacian lingvon; por sciigi siajn membrojn pri la disvastigo de l' stenografio en la diversaj landoj; por la verkado de teknika vortaro ktp.

Nun, la provizora komitato eldonas „Rondirantan Gazeton“, atendante ĝis kiam la societo estos fondita kaj iom forta, por eldoni pli gravan gazeton.

Kiu volas helpi la starigon de tiu asocio, kies kotizo estas malalta, estas petata sin turni al la provizora sekretario: s-o P. Flageul, 9, Bulvardo Voltaire, en Issy (Seine), Franclando.

Aliaj gazetoj bonvolu menci.

Gazetaro.

The Times and Directory, Bournemouth, 12. 5. Detala art. pri Easn. okaze de la Brita Kongreso, kun 4 portretoj de Esperantistoj.

Hotelier, Praha, 6. 5. Of. organo de ĉsl. Hotelestra Asocio. Art. „Esp. en hotela industrio kaj la tiurilata rezolucio en Venezia“. de Aug. Pillik. — Kun aldonita „Mangokarto“ en lingvoj Esperanta kaj ĉeha, de A Pillik. Ĉeĉebia por 1.50 kĉ. ĉe la redakcio de „Hotelier“.

L'Armée Nouvelle, Paris, 16. 5. Art. pri Esp. „L'armée et la question des langues“, de Léon Méras.

Les Nouvelles, La Louvrière, 18. 4. Pri Venezia.

O Seculo, Lisboa, 30. 4. Pri Venezia

Neue Zürcher Zeitung, 15. 5. Art. de „Esp. Press“.

Die Rote Fahne, Wien, 10. 5. Esp. angulo.

Salzburger Chronik, 9. 5. Art. pri deklamo en Esp. ĉe Peŝtf-festo en Budapeŝt.

Salzburger Volksblatt, 7. 5. Art. pri disvastigo de germana kulturo en eksterlando per Esp.

Ziemia Lubelska, Lublin, 6. 5. Art. pri Venezia. — Anonceto pri Esp.

Volksstimme, Magdeburg, 13. 5. Noteto.

Latvijas Serĝs, Riga, 13. 5. Pri Albanio, laŭ „Esp. Press“.

Jaunatnes Dzive, Riga, 18. 3. Pri Esp. — 25. 3. Pri egipta faraono, laŭ ET — 6. 5. Esp. kaj nacioj. — La artikoloj estas verkita de T. Indra kaj C. d Kairo.

Students, Riga, 7. 2, 7. 5., 21. 5., 18. 4., 25. 4. kaj 9. 5. Kun anoncoj kaj art. pri Esp. kaj ido. Por Esp. akribla Edg. Grot kaj T. Indra.

Listo de la donacintoj por la XV-a.

Blindula Kaso.

Rosenhauer, Grossenhain, gmk. 500. Bačela, Kaunas, lit. 5. Posnien, Königsberg, gmk. 500. Berthold, Merseburg, gmk. 500. Schöne Eibenstock, gmk. 100. Berling, Palanza, lit. 1. Rubis-Rubaževicius, Kaunas, lit. 1. Panem, Syke, gmk. 200. Gehrre, Bregenz, gmk. 1000. F-ino Marlinson, Tallin, est. mk. 25. Saar, Tallin, est. mk. 25. Meis, Vöhma, est. mk. 20. F-ino Grimm, Prag, kĉ. 5. D-ro. Rosenbaum, Prag, kĉ. 5. Bischitzky, Prag, kĉ. 20. Pressburg, Prag, kĉ. 10. Borges, Prag, kĉ. 20. Schreck, Nürnberg, gmk. 500. D-ro. Spielmann, Bern, sv. fk. 2. Sudmann, Syke, gmk. 500. Scheria, Vruiky, kĉ. 5. Dro. Hubert, Budapest, h. k. 100. F-ino Dro. Brichia, Budapest, h. k. 100. Papenihln, Halle, gmk. 500. F-ino Hayne, Dresden, gmk. 1000. Köcher, Bauden, gmk. 2000. Schopen, Goch, gmk. 1000. Soliau, Bergedorf, gmk. 1900. Hude'a, Olomouc, kĉ. 5. Jedlika, Nedvezi, kĉ. 5. F-ino Meiz, Aachen, gmk. 1000. F-ino Van Doorne, Rotterdam, hfl. 1. F-ino Wagemaker, Rotterdam, hfl. 1. F-ino van Eyck, Rotterdam, hfl. 1.50. Zeidler, Berlin, gmk. 1500. Hahn, Horrem, gmk. 900. Kafalief, Plovdiv, leva 20. Kafalief, Plovdiv, leva 20. Bonnevie, Kristiania, kr. 5. Schweers, Bremen, gmk. 500. F-ino Pank'atz, Berlin, gmk. 500. F-ino Van Gelder, Haag, hfl. 2.50. Kolczycki, Lodz, gmk. 500. Horn, Jägerndorf, kĉ. 20. Wolf, Dresden, gmk. 500. Pausi, Bissler, Frohburg/Sa., gmk. 500. Witz, Eger, kĉ. 10. Baumgärtel, Reichenbach, gmk. 1000. Bischitzky, Heidelberg, gmk. 500.

Leterkesto de ET.

E. S. en Mockfjärd. — Certe ni ricevis la mendon kiun vi kun mono transdonis al n'a abonejo. Sed ĉar ĝi ne povas tuj sendi al ni ĉiun unuopan mendon, kaj ĉar la poŝtoj ĉe ni nun ne funkcias regule, multaj leteroj prokrastiĝas.

V. Dubrovsky en Gorodna (?). Dankon pro via entuziasma laŭdo, kiun ni ne publikigos, ĉar ni opinias, ke ĝi ne estas tute merita. — Bonvolu skribi vian adreson latinlitere, ĉar cirilajaj literojn ni povas nek facile legi nek korekte skribi.

R. L. en Tallinn. Dankon pro manuskriptoj. „Peizoid“ jam ne estas aktuala. „Antikveco de l' homa vivo“ laŭ novaj scigoj ne fidinda. Ceteraj manuskriptoj aperos. Interŝanĝi ni ne povas, pro malsimpligo de administracio. Ekzemplerojn kun viaj artikoloj ni volonte liveros senpage.

P. E. S. en Bydgoszcz. — Via alvoko kaj la anonco de prof. K. aperos en venonta numero.

G. J. en Falun. — Dankon por la abonvarbado! Ni pillongigis rekompence vian abonan.

L. L. en Karuna. — Ĉiuj tri monsendaĵoj menciitaj en via letero de 22 majo bone alvenis.

G. D. en Tirmovo. — Se vi povas aĉligi al ni la numeron de ET, en kiu aperis la anonceto, ni klopodos helpi vin. Bedaŭrinde ni ne scias rimedon por certe eviti, ke „sam'deanoj“ ne sendas promesitajn en anonceto objektojn (ekz. stampilojn!).

Parolejo.

173. „Setelmentoj“),

(Rilatas al 159.)

„Settlement“ estas angla vorto, kiu ordnare signifas malgrandan kolonion aŭ la anaron de homoj kiuj unue kolonias novan landon. Laŭ speciala senco ĉi tiu vorto signifas kolonieton de kleraj homoj, kiuj loĝigas en malriĉula kvartalo por labori bonfareme inter la loĝantaro. Ordinare la „kolonistoj“, kiuj havas la nombron de 6 ĝis 20, ekokupas grandan domon; kaj ĉi tiu domo iĝas centro por socia, insirua kaj religia laborado. Unu el ĉi tiuj institutoj oni nomas: „Komunuma Centro, Popola Kolegio kaj Klubo“. Ekzistas virinaj Settlements kiel ankaŭ vir

plimulto de tiuj, kiuj partoprenis, estis loĝantoj de la kongreslando. Sed la junularo ĉiam deziris viziti la U.K., pri kiuj ili tiom aŭdis.

La nunjara U.K. en Nürnberg versajne ĉeestas multajn diverslandajn junulojn, pro tro multekosta vojaĝo. Sed estas dezirinde, ke estu male. Esperanta agado inter la junularo ludas gravan rolon en la mondlingva movado, kaj tial estas dezirinde, ke kiel eble plej multaj junuloj el diversaj landoj partoprenu la fakkunsidon de la junularo ĉe la XV-a, kiu devos fariĝi grava en la historio de la junulara Esp. movado; ĉar, se mi ne eraras, oni intencas starigi je la tagordo demandojn pri fondo de Tutmonda Junulara Federacio, prilakto de novaj vojoj por agado inter junularo ktp. Ankaŭ estas dezirinde, ke ĉi tiun fakkunsidon partoprenu kelkaj rajtigataj delegitoj el ĉiu lando.

Sed kion fari? La junularo ne estas sufiĉe riĉa por viziti la kongreson. Malofte okazas, ke iu nacia aŭ loka unuigo de Esp. junuloj povas sendi tute aŭ parte je siaj kosto delegitojn al U.K. Mi proponas fondi komitatojn (estas bone, se tiun taskon prenis la kongresa komitato) por ebligti al malbonvalutaj unuigoj de Esp. junularo en Polujo, Aŭstrio, Rusujo alsendon de kelkaj junuloj al la kongreso. Mi ne mencias la germanojn, ĉar en ilia lando okazos la kongreso, kaj al ili sendube estos pli facile viziti la kongreson ol al alianduloj. La bonvalutaj Esp. unuigoj starigu sekcion por alsendi siajn delegitojn kaj helpi al malbonvalutuloj. Tiamaniere la U.K. partoprenus diverslandajn junulojn, kiuj unufoje povus ĝui ĉiun kongresalogojn kaj amuzojn.

J. Draiver,
ano de junulara sekcio
ĉe Esp. Soc. „Laboro“ en Warszawa.

175. Genf kaj Venezia.

Laŭ mia opinio, iu estonta konferenco devus sendi invitojn al la registaroj de la tuta mondo enkonduki Esperanton en ĉiuj lernejoj kiel devigan fakon. La rezultoj fiksita je la konferenco en Genf kaj Venezia pravas, ke la enkonduko estas urĝe rekomendinda. La konferencoj pravas la taŭgecon de la lingvo por la interparolado, kaj la eldiroj de la ĉinaj kaj japanaj delegitoj pravas, ke la enkonduko de Esperanto estas urĝa bezono. Se ni atendas la juĝon de la nekompetenta intelekta komisiono, ni povos ankoraŭ longtempe atendi.

R. Lidl, Fohnsdorf.

„UKRAINA STELO“

Organo de ukrainaj Esperantistoj.

Plej bona informilo pri popolaĵ vivo, kutimoj, moroj, suferoj kaj krea spirita forto de ukraina nacio.

Jara abono por landoj kun malbona valuto 10.000 pol. mk. por landoj kun bona valuto duoble.

Redakcio kaj administracio: Eldonejo „Bystrycia“, Ivan Čepuha, Stanislavovo, Lypova str. 76, Orienta Galicio, Eŭropo.

9 La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof 9

Inda memorlibro, presita sur lukas papero, kun multaj ilustraĵoj laŭ originalaj fotoj. Nepe havinda komplemento al la libro de D-ro Privat: La vivo de Zamenhof.

Prezoj: por malbonvalut. 1,20 gmk. multipl. per ŝloslin. por bonvalut. 1,30 fk. aŭ egalvaloro.

Taglibro de Vilaĝpedelo

Interesa romansimila rakonto de la dana verkisto Blicher. Tradukita de s-ano Bulhuls, LK-ano. Rekomendita de ELA.

Prezoj: por malbonvalut. 0,75 gmk. multipl. per ŝloslin. por bonvalut. 0,75 avis. fk. aŭ egalvaloro.

Oni ridas

Bela kolekto de veraj perloj de bonhumoro kaj spirito. De s-ano Rieck. Rekomendita de ELA kaj reviziita de Zanoni, literatura redaktoro de ET.

Prezoj: por malbonvalut. 1.— gmk. multipl. per ŝloslin. por bonvalut. 1.— avis. fk. aŭ egalvaloro.

Per sendkoston oni aldonu 10% al la supre nomitaj prezoj

Butin & Jung, Godesberg (Germanujo)

Esperanto-eldonejo, Bahnhofstr. 30
Postŝeka konto Köln 920 36.

Anoncetoj.

NASKIĜO. — Al ges-oj Andreja kaj Liliĵa Fridenberg en en Riga (Latv.) naskiĝis filino, nomita Rasma Meilaende. [1]

NASKIĜO. — La 12. apr. naskiĝis al ĝesinloroj Ewald Schwarzkopfen Merseburg (Germ.) filo nomata Wolfgang. [1]

FIANCIGO. — Fraŭlino Lulu ĵudi el Cronenbourg kaj fraŭlo Henriko Habermehl, mekanikisto kaj scienculo el Strasbourg fianĉiĝis la 20. apr. [1]

EDZIĜOPETO. — 25 jara fraŭlo (Esperantisto) kun forte konservativaj moralaj kvalitoj serĉas 17—22 jaran sinceran amiklinon en sia vivo, precipe Esperantistino, kiu ebligas daŭrigon de universitata studado eksterlande. Seriozan proponon kun foto adresu al: Dimitir P. Tuganov en Pazarĝik (Bulg.). [1]

ADRESSANĜO! — Bonvolu noti nian novan adreson: Pola Esperanto-Servo, gvid. Fr. Prengel (Globig'a libroj) Bydgoszcz, Długa 1. Esp. Oficejo malfermata ĉiutage de 9—1 kaj 3—6. [3]

S-O P. MEDEM, Kaunas (Litovujo) forveturinte petas proklari korespondadon ĝis post la XV-a. [2]

DU HOTELFAKULOJ serĉas okupadon je ĉiuj kondiĉoj en eksterlandaj grandaj hoteloj por lerni perfekte la anglan lingvon. Proponoj al Robert Falsmann en Trautenua (Ĉeĥoj) Kreuzplatz Elektragasse 1. [1]

„VENDREDA KLUBO“ kunvenas en Köln, restoracio de „Schauspielhaus“ ĉiun vendredon vespere je la 8-a kaj invitas je vizito ĉiujn samideanojn. Oni parolas nur Esp. [2]

EKSPORTADO de ĉiuspecaj kreskaĵoj spontaneaj de Suda Italio, aromaj medicinalaj kaj aliaj el ajn uiligibla. Sin turni al s-ro Doktoro Matteo Labella en Potenza (Italio). Korespondanto ankaŭ franclingva. [1]

FRANCAJ STUDENTOJ! Kiu volas interŝanĝi kun mi restojn dum la somera libertempo, skribu al drogisto Ronay en Přešov (Ĉeĥoj). [1]

KREMENCUGAJ ESPERANTISTOJ. dezirantaj aranĝi propagandecoj por-esperantan ekspozicion petas helpon en ĉi iu entreprenon. Esperantistoj kaj korespondantoj estas danke akceptataj. — V. Kolčinskij, Puškin-str. 27 en Kremencug (Rusl.). [1]

ATENTU! Malofte okazas! Ofertas moneraron. Inter aliaj „konstituciaj taleroj“ en originala paketo monerela, malalta kaj neuzita garantite. Petu informojn! S-o Grosser, en Magdeburg (Germ.) Bredowstr. 2, Zimmer 62. [1]

OKAZAĈETO por grupoj aŭ samideanoj! Mi vendas Esperantan bibliotekon, 75 libroj bone kaj bele binditaj. Demandu prezon ĉe s-o Robert Wolf, Alaunstr. 3 en Dresden-N. (Germ.). [1]

KURACISTOJ! Esperantie, ke ekzistas ankoraŭ kuracistoj-bonuloj, mi kuraĝas petigi helpon de ili por mia kara fraŭlino dancere malsana. En ŝia stomako kreskas ulcero, kaj ŝi estas korpe malforta kaj havas malmulte da saĝo. Ĉu ekzistas helpe kontraŭ ĉi tiu malsano? Kiel kuraci ĝin? Estimataj a-oj kuracistoj! Helpu! Mi estos tre danko al vi. — Mendinto de la anonco scigu sian adreson al la admin. de ET. [1]

OLUMARKOJ pri la konferenco en Venezia. 100 por 1 avis. fk. aŭ 2 fr. fk. aŭ 2 lir. aŭ egalvaloro. Pri la foto de Budapest por duono de la nominala prezo. — P. Balkanyi, Budapest, VI. (Hung.) Hajos-u. 15. [2]

Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj.

Pravu ke ekzistas dekmil! UEA bezonas dekmil membrojn.

ALIĜU AL UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO!

Atentu! Favora propono! Atentu!

Vi povos partopreni la kongreson, se vi vendos al mi la por vi neutilajn aĵojn! :-: Mi aĉetos:

Oron! Platenon! Argenton!

(artaĵn dentojn kaj dentarojn, ringojn, argentaĵojn ktp.

Necese mi bezonas tion kiel dentisto!

Zacher Georg, Nürnberg,
Sielstr. 3/3. Sielstr. 3/3.

Atentu! Favora propono! Atentu!

Jus aperis nova rusa libro
La Kvinjaro de Sovetlandoj
Luksa eldono, havanta pli ol 80 paĝojn kun 70 ilustraĵoj.

La tuta profito de la eldono estas transdonata al la Tutruslanda Komisiono por ilkvado de malsanosekvoj.

Prezo: 2 sv. fr.
Bonvalutuloj kaj mezbonvalutuloj mendu ĉe ET, malbonvalutuloj ĉe k-o Rich. Lerchner, en Leipzig-Stö. Colmsstr. 111.

Baldaŭ aperos:

BUKEDO

Kolekto de naŭ rakontoj originalaj kaj tradukitaj de diversnaciaj ĝesinloroj (Baghy, Bulhuls, Hohlov k. a.)

88 paĝoj, kartonite.
Prezo 1 avis. fk. Por malbonvalutuloj 1 gmk. x ŝloslinombro. Por ET-abonantoj 3 ET-numeroj.

Antaŭmendojn akceptas la eldonejo de
Esperanto Triumfonta, Horrem
bei Köln (Germ.).

Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj!

Kongresanoj por la XV-a:

2761. Filas Rosa, f-ino, Erfurt
2762. Erbe Lina, f-ino, Erfurt
2763. Köcher Alfred, Rauden
2764. Krieger Friedrich, Stettin
2765. Siehle Max, Dresden
2766. Heyme Elisabeth, f-ino, Dresden
2767. Lufas Dora, f-ino, Königsberg
2768. Groll Ernst, Jena
2769. Hasda Elfriede, f-ino, Reichenberg

2770. Umann Anna, f-ino, Reichenberg
2771. Hofmann Grete, f-ino, Breslau
2772. Benés Ruda, Zelezny Brod
2773. Stöbel Berta, s-ino, Reichenbach
2774. Heidrich Hans, Rehberg
2775. Frommelt Kurt, Döbeln
2776. Zeidler Willi, Berlin
2777. Schopen Jakob, Goch
2778. Kelson Sonja, Kovno
2779. D-ro Schuppel K., Parchin
2780. Schütt Else, f-ino, Berlin-Fried.
2781. Brügmann Arthur, Dresden
2782. Schuppel, s-ino, Parchin
2783. Henel Robert, Kochet
2784. Lippmann Marie, f-ino, Altstadt-Teischen

2785. Weis Marie, f-ino, Teischen
2786. v. Doorne Cornelia, f-ino, Rotterdam

2787. Lusinietz Filomena, f-ino, Welsdorf

2788. Diaz Alberto, Bilbao
2789. Ullaortua Pedro, Bilbao

2790. Metz Mimi, f-ino, Aachen
2791. Winter Julie, f-ino, Hof
2792. Lommatsch Albert, Hof

2793. Ruitmann Ernst, Stuttgart
2794. Flatters Joh., Mainz

2795. Bonnevie Honoratus, Kristiania
2796. Lövinger Ludoviko, Nové Zamky

2797. Novotna Marie, f-ino, Nimerice
2798. Weiss Else, f-ino, Nürnberg

2799. Hudec Anton, Olomouc
2800. Jedlicka Vojtech, Nedozi

2801. Rebeck Josef, Olomouc
2802. Rebeck Jaromir, Olomouc

2803. Mrázková Tonca, f-ino, Olomouc
2804. Jandlova Maria, f-ino, Olomouc

2805. Grün Emma, f-ino, Olomouc
2806. D-ro Fischer Josef, Weidenau

2807. Sende Hans, Chemnitz
2808. Wegerle Johann, Gnoitzheim

2809. Piatil Ippolito, Milano
2810. Cattorini Luciano, Milano

2811. Cattorini Gina, s-ino, Milano
2812. Girola Giovanni, Milano

2813. Brega Pietro, Milano
2814. Capponi Maria, f-ino, Milano

2815. Landl Maria, f-ino, Milano
2816. Wagemaker Ankje, Rotterdam

2817. van Eyk Antonie, Rotterdam
2818. Nussbaumer Friedrich, Eger

2819. Fischer Christoph, Wassersuppen
2820. Fischer Marie, s-ino, Wassersuppen

2821. Siegel Fritz, Annaberg
2822. Bishitzky Fritz, Heidelberg

2823. Lösch Teodor, Frohburg
2824. Kunze Heinrich, Seifhennersdorf

2825. Kunze Hanny, s-ino, Seifhennersd.

2826. Wolf, Nedwid, Wien I.

2827. Vogt Margarete, Nürnberg

2828. Vogt Maria, Nürnberg

2829. Grimm Wilhelm, Oppeln

2830. Kühn Ilse, f-ino, Zittau

2831. Garielmann H., Bremen

2832. Garielmann, s-ino, Bremen

2833. Petrov Aleksander, Varna

2834. Sapunĝief George, Varna

2835. Stierfeld Arje, Lodz

2836. Vladislavjevic Marianne, fraŭlino, Pilsen

2837. Beck Charlotte, f-ino, Pilsen

2838. Löschner Rudolf, Prieschen

2839. Löschner Agnes, s-ino, Prieschen

2840. Kalita Jadviga, f-ino, Kaunas

2841. Kukucz Karl, Peterswald

2842. Cincia'a Karl, Peterswald

2843. Harris Jessie, f-ino, Leicester

2844. Osmond Cicely, f-ino, London

2845. Osmond Emma, f-ino, London

2846. Grogan Gertrud, s-ino, London

2847. Kook Mary, f-ino, London

2848. Rademacher Peter, Kieve

2849. Merrick Percy, Woodleigh

2850. Merrick Charlotte, s-ino, Woodleigh

2851. Balasus Curt, Leipzig

2852. Schumpelt Hermann, Leipzig

2853. Pankratz Frida, s-ino, Berlin

2854. Schweers Friedrich, Bremen

2855. Raum Herbert, Radebeul

2856. Richter Josef, Bratislava

2857. Richter Marie, s-ino, Bratislava

2858. Wiltseck Cornelia, s-ino, Bratislava

2859. Cseppau Rudolf, Bratislava

2860. Cseppau Hermine, s-ino, Bratislava

2861. Gülte Elisabeth, f-ino, Bratislava

2862. Reisenauer Christine, f-ino, Bratislava

2863. von Schmidt auf Altenstadt, Szege

2864. Ahlström Ellil, f-ino, Stockholm

2865. Paust Friedrich, Altstadt Rottweil

2866. Rumpf Adolf, Rehe/Westerwald

2867. Elezcano José, Bilbao

2868. Elezcano Manuel, Bilbao

2869. Fiedler Gertrud, f-ino, Bodenbach

2870. Lorenz Maximilian, Kroschwitz-Bödenbach

2871. Klinger Marie, s-ino, Bodenbach

2872. Klinger Hans, Bodenbach

2873. Bayer Klara, f-ino, Garmisch

2874. Volk Hans, Garmisch

2875. Klein Centa, f-ino, Garmisch

2876. Feldner Hermann, Partenkirchen

2877. Holzer Josef, Partenkirchen

2878. Baumann Hermann, Selb

2879. Kramas Alexander, Selb

2880. Michael Karl, Selb

2881. Siebenkäs Heinrich, Selb

2882. Marelova Marie, f-ino, Bily Ujezd

2883. Bässler Fritz, Frohburg/Sa.

2884. Hlučil Kamilla, Zlín

2885. Hlučil Karlo, Levice

2886. Kupkova Vilma, f-ino, Trebechov

2887. Zlatev Ilija, Tirmovo

2888. D-ro Helman, Lodz

2889. Mahler M., Lodz

2890. Rorewblatt, s-ino, Lodz

2891. Kurass Emil, Stuttgart

2892. Grünberg Ernst, Tallinn

2893. Sönnä August, Nomme

2894. Püttsep August, Tallinn

2895. Grünberg Sinaida, f-ino, Tallinn

2896. Grünberg Marie, s-ino, Tallinn

2897. Pitser Roman, Nomme

2898. Sulg Johann, Tallinn

2899. Laur Günther, Tallinn

2900. Laur Alvina, s-ino, Tallinn

2901. Fogelberg Johannes, Saue

2902. Püllberg Rudolf, Rusepere

2903. Bennšahar Jaques, Alexandria

2904. Remera Hermann, Düsseldorf

2905. Schlobach Lene, s-ino, Reichenbach

2906. Schwaneberg Erich, Wismar

2907. Dittmer Paul, Wismar

2908. Peters Karl, Wismar

2909. Polanskij Nik., Balašov

2910. Petrov M. N., Barnaul

2911. Polak G., Kievo

2912. Rozenfeld, Kievo

2913. Kietienik S., Rostov-Don

2914. Abramov A., Serpuhov

2915. Koudracky P., Tverj

2916. Lebedev J., Tula

2917. Alan Airob, Urgd

2918. Trahterov A., Moskvo

2919. Ivanov Gleb, Moskvo

2920. Varlamov L., Moskvo

2921. Kurdjukova H., Moskvo

2922. Prager A., Moskvo

2923. Smirnov K., Moskvo

2924. Serebrovsky N., Moskvo

2925. D-ro Lindkrist B., Moskvo

2926. Deškin Georgo, Moskvo

2927. Kurdjukova, Moskvo

2928. Romanovič Dm., Moskvo

2929. Fomichev Vl., Moskvo

2930. Witz Karl, Eger

2931. Baumgärtel Hermann, Reichenbach

2932. O'Brien, Elizabeth, f-ino, London

2933. Katalief Georgij, Plovdiv

2934. Katalief Nikola, Plovdiv

2935. Kockskemper Willi, Stöde

2936. Schmidt Johann, Dresden

2937. Hauber Richard, Kaiserslautern

2938. O'Brien, f-ino, London

2939. Wolf Robert, Dresden

2940. Šupichova Julie, f-ino, Praha

2941. D-ro Kamaryt Stanislav, Bratislava

2942. Vukova Zdenka, f-ino, Pezínak

2943. Horn Rudolf, Jägerndorf

2944. Horn Else, f-ino, Jägerndorf

2945. Kolczycki Laib, Lodz

2946. Blahut Herbert, Leobachütz

2947. Moudra Marie, f-ino, Praha II

2948. van Gelder Elisabeth Maria, Haag

2949. Loewe Eugen Ludwig, Berlin-Dahlem